# *Asesoranto de Nacia Sekureco de Trump koncedas ke Biden gajnis la elektojn*




Va?ingtono, nov 17 (RHK) La asesoranto de Nacia Sekureco de Usono, Robert O´Briden koncedis ke la demokrata kandidato Joe Biden gajnis la elektojn fronte al sia respublikana rivalo, la nuna ?tatestro Donald Trump.

La asesoranto de la Blanka Domo, dum deklaro donita ?i-lunde en la Forumo de Sekureco, agnoskis ke “evidente” la formulo demokrata formita de Joe Biden (prezidanteco) kaj Kamala Harris (vicprezidanteco), gajnis en la elekto de la pasinta 3-a de novembro.

O'Brien  esprimis ke, kvankam  ekzistas malakordoj politikaj pri la venko de la demokrata teamo,  se oni decidas ke la bileto de Biden-Harris estas la gajninto, (tiel kiel), evidente, la aferoj estas tiel vidataj nun”, la administracio de Trump garantios profesian pov-transiron.

Trump, la unua prezidento en 28 jaroj kiu ne estas reelektita por dua mandatperiodo, ne agnoskas la venkon de Biden kaj eluzas argumentojn kiel elekta fra?do a? ke li portos la temon al juraj instancoj.

La respublikana magnato lan?is tiajn argumentojn, spite al tio ke kelkaj organizoj, inter ili, la Federala Elekta Komisiono esprimis ke ili ne trovis ian ajn indicon pri fra?do en la elekta procezo.

Fonto: HispanTV

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/239911-asesoranto-de-nacia-sekureco-de-trump-koncedas-ke-biden-gajnis-la-elektojn

**Radio Habana Cuba**